

Sud-Rejna Kuriero

Julio
2011

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°43

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

Nia lernojaro ĵus finiĝis per komuna manĝo la unuan de julio.

En tiu lasta trimestro okazis pluraj eventoj. Kelkaj niaj membroj estis en Strasburgo la 8an de majo ĉe la Eŭropa parlamentejo.

En Kaysersberg Jim Petit montris al ni sian talenton en muzika kaj danca spektaklo uzante Esperanton.

En Espace 110 ankaŭ Esperanto ricevis honoron.

Afrikanoj el Angolo okazigis en Colmar informon pri la lingvo.

La fervojista kongreso sukcese okazis en Liberec.

Novaj eblecoj aŭskulti Esperanton per la reto, eĉ pli oportune ol per enŝalto de radio-ricevilo.

Jen maŝina tradukado per retejo de la franca al Esperanto.

Niaj lundaj kunvenoj bone kaj daŭre funkciis kaj rekomencos en venonta septembro.

Jen ankaŭ invito portopreni la komunan aranĝon de Bavelo kaj EFE en Villigen.

Kaj finfine ni deziras al ĉiuj :



Agrablajn somerajn feriojn

André Grossmann

SRK (6/2011) N° 43 paĝo 1/20

Nia ekskurso iros sabate la 27.08.2011 al la Chaux-de-fonds, kie ni festos la 80 jarojn de Claude Gacond.

Bonvolu aliĝi al tiu renkontiĝo rekte ĉe SES, ĉar la organizantoj devas antaŭ-mendi la menuon.

(Sed bonvolu diri ankaŭ al mi por ke ni povu organizi la transporton).

22.09.2011 Monata kunveno en nia salono

27.10.2011 Ni parolos pri la ferioj

24.11.2011 Programo

10.12.2011 Zamenhofa festo 2011
 organizita de la Bazela grupo

Nicole Béroud

Francophonie und Globalisierung ! (Teil 3 von 4)

AAlles auf Englisch oder die Unmöglichkeit, wissenschaftlich zu denken

Es kommt noch schlimmer : Die Überflutung der wissenschaftlichen Denkweise durch das Anglo-Amerikanische provoziert eine hinterhältige intellektuelle Atrophie bei den Forschern und Professoren der Universitäten. Sie verringert nicht die Intelligenz, sie kanalisiert sie, bringt sie vom richtigen Weg ab, so weit, dass sie nur noch ein einziges Muster abbildet : das anglophone Muster.

In einem grundlegenden Werk, das vor ein paar Jahren erschienen ist, aber immer noch aktuell ist, hat der Ingenieur und Informatik-professor, Charles Durand, die Oberhand des anglo-amerikanischen Analyse-Systems über die gesamte wissenschaftliche Denkweise kritisiert. Seine Erfahrung aus längerjähriger Unterrichtstätigkeit in den Vereinigten Staaten und in Kanada erlaubt ihm ein verblüffendes Bild von den weltweiten Universitätspraktiken zu malen.

Nachdem er daran erinnert hat, dass kein Gedanke außerhalb der Sprache existiert, die ihn konkret macht, zeigt er auf, wie die Unterwerfung unter einer einzigen Sprache originale und viel versprechende Winkel der Forschung, die aber unterschiedlich von den englischsprachigen Lehrern aufgezwungen sind, verdeckt.

Das Englische wurde gewählt, nicht weil es die günstigste Sprache ist für den wissenschaftlichen Ausdruck, sondern weil diese Sprache unter dem Impuls Amerikas zwischen 1914 und 1945 alleine von dem europäischen Bürgerkrieg profitiert hat. Die englische Sprache hat dadurch eine mythische Dimension erworben.

Überzeugt, dass alleine der gezwungene Durchgang durch die amerikanische Forschung Anerkennung und Zukunft verleiht, träumen die Forscher der ganzen Welt davon, in den amerikanischen Zitaten-Registern zu erscheinen. Es ist auch wahr, dass die Mehrheit der Inhaber von Lehrstühlen oder Laboratorien sich auf diese beziehen, um neue Forscher anzustellen.

Darüber hinaus steht eines fest: je mehr die europäischen Wissenschaftler auf Englisch publizieren und sich unterhalten, desto unauffälliger werden sie.

Zuerst einmal, weil außer für einige Ausnahmen, sie es nie schaffen, die ganzen Feinheiten ihrer Denkweise in einer Sprache auszudrücken, die nicht ihre Muttersprache ist. Zweitens, weil sie aus Angepasstheit und Notwendigkeit nur Forschungsgebiete auswählen, die in die anglo-amerikanische Richtung gehen. Und schließlich, weil sie nur selten etwas Originelles publizieren, da die ursprünglichen Forschungsleiter, d.h. die, die von den amerikanischen Instanzen abweichen, vernachlässigt werden.

Ni aldonas la numeron de nia konto PC 40-33714-4 Esperanto Societo Basel por la jarkotizo 2011 al tiuj personoj, kiuj ne aktive partoprenas en nia rondo, la aliaj bonvolu pagi rekte al kasisto. Anticipan dankon.

Membro unuopa: CHF 25.– Paro: CHF 30.–

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

mulhouse-esperanto@yahogroupes.fr

Esperanto en la Eŭropa Parlamentejo en Strasburgo, la 8an de Majo 2011.

Ĉi-jare, refoje oni parolis pri Esperanto dum la tradicia tago de malfermaj pordoj de la Eŭropa Parlamentejo, kiu okazis dimanĉe, la 8an de Majo 2011.

La strasburga klubo deĵoris kun alzacaj kaj germanaj samideanoj por promocii Esperanton al la 17000 vizitantoj,



kiuj ĉiuj vidis la budon sekvante la cirkvilon de la vizito.

Esperantistoj ankaŭ ĉeestis la debaton, kiu okazis en la grandega kunveno de la parlamentejo. La temo estis : volontulado kaj bonvolemo en Eŭropo.

Kompreneble ne ĉiuj vizitantoj haltis ĉe nia budo, sed tamen multaj interesi-

ĝis. Ni esperas, ke ni transdonis al ili la deziron lerni la zamenhofan lingvon kaj ke denove kelkaj lernantoj vizitos niajn kursojn aŭ renkontojn.

Anne VERNET

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2011-2013

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivaĵojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

| Jaro | Kotizo | Abono |
|------|------------|------------|
| 2011 | 6,00 eŭroj | 6,00 eŭroj |
| 2012 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj |
| 2013 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj |

Pagebla al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM
Ĉekojn je la nomo de:
Mulhouse-Esperanto
CCP 19684 F Strasbourg.

Li Ŝi kaj Senso Ĉielo : de la originoj al kuniĝo pere de amo ! Spektaklo de Jim PETIT kaj ties trupo ARTOTUŜI

Komence en majo 2011 venis informo pri koncerto en Kaysersberg kun uzado de Esperanto. Jen la invito:

"LUI ELLE & SENS CIEL"

Un spectacle d'Art Total sur le féminin et le masculin Arts Plastiques, Danse, Musique, Vidéo Badhus - Kaysersberg C'est avec joie que nous vous invitons à assister à la première de notre nouveau spectacle, aboutissement d'un travail démarré fin 2008. Nous nous sommes interrogés sur ce qui fait de nous une femme, un homme. Quelles sont nos relations à la féminité et à la masculinité ? Comment parvenir à réconcilier ces deux entités qui font de nous de véritables êtres humains ? Écrit en espéranto, la langue universelle, ce spectacle - opéra d'arts croisés, se déroule en plusieurs tableaux (accompagné d'un livret en espéranto - français). On y suit des âmes, des femmes, des hommes, leur rencontre, leur séparation, leur union... Pour ce spectacle, nous avons travaillé avec des adolescentes et adolescents de la ville de Kaysersberg, qui, lors d'ateliers artistiques, ont participé à l'élaboration des décors du spectacle, à la réalisation de dessins intuitifs, à l'apprentissage et l'enregistrement de guitares slides, à la découverte du chant et des flûtes harmoniques...



En Kaysersberg
la 13/14ajn de majo 2011

Komence, estis liberaj animoj, rigardoj, ridetoj, serĉantaj fizikajn korpojn por enkarigi en la surteran mondon.

Jim Petit kaj lia trupo ARTOTUŜI (tuŝi arton) sukcesis surscenigi artan prezentaĵon en kiu ŝajne plene evidentas uzi Esperanton, kiel justan interhoman komunikilon apud muziko kaj danco. Plej diversaj eĉ ekzotikaj muzik-instrumentoj estis uzataj (ekz. japana ŝamiseno) por transdoni la emociion al la publiko. Klara ina voĉo kant-recitis en Esperanto, dum emociojn tradukis korpen du graciaj dancistinoj.



Fotoj de
Andreo

La publiko disponis pri la esperantlingva teksto kun traduko al la franca. Ĝi do ankaŭ malkovris Esperanton. La ĉeestantaj esperantistoj kompreneble ne malavaris kun informoj al la petintoj.



Honor-medalo pro pluraj jaroj da aktivado por Esperanto en Illzach (Alta-Alzaco)

Lunde, la 30-an de majo 2011, André GROSSMANN ricevis de la urbestro de Illzach (apud Mulhouse) honor-medalon pro pli ol 15 jaroj da bonvolema aktivado en la belega kulturcentro ESPACE 110.

Tie li gvidas plurfoje dum semajno Esperanto-kursojn kaj prezidantas/kasistas por la grupo MULHOUSE-ESPERANTO. Antaŭ la multnombra ĉeestantaro. André kompreneble profitis la okazon por reklami pri nia lingvo kaj ĝin aŭskultigi. Vi sciuj, ke pro siaj kasistaj funkcioj en diversaj asocioj li kutimas sin prezenti per gramatika kuriozaĵo : mi estas « kasistoj » !!!

Gratulon kaj dankon pro lia senlaca laborado !

Edmond Ludwig.



Prelego en CADA-COLMAR

Merkrede, la 1-an de Junio, mi veturis al COLMAR laŭ invito de Fernando ANGOLA prelegi en CADA-COLMAR, loĝejo por azil-petantoj, cele al rekrutado de gelernantoj por Esperanto-kurso, kiun intencas gvidi Fernando.

La surprizo estis, ke la respondeculino de la centro anoncis al mi, ke Fernando estas enhospitaligita kaj ne povos ĉeesti ! Jam mi pretis forveturi kaj viziti Fernandon en la apuda hospitalo, sed lia amiko Mayi alvenis kaj asertis, ke li vaste informiĝis kaj ke li zorgos pri ĉio. Li do helpis al mi instali la ekspozicion kaj iom post iom alvenis ĉefe francparolantaj afrikanoj, kelkaj homoj el Kosovo kaj parto de la deĵorantaro. Fine mi havis la plezuron prelegi antaŭ tri-deko da personoj. Multis ankaŭ la demandoj en publiko, inter kiuj ne maloftis la poliglotoj. La tuto finiĝis per komuna trinkado kaj gustumado de dolĉaĵoj.

Post malmunto de la ekspozicio Mayi kaj mi vizitis Fernandon en la hospitalo.

Edmond Ludwig.



LA 63a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO- FEDERACIA KONGRESO

7a -14a de majo 2011

Ĉefaj esperantistoj preparis por fervojistoj eksterordinare bonan IFEF-kongreson en la bela nordbohemia urbo Liberec. La aranĝo okazis en la luksa Centro Babylon. Partoprenis ĝin 173 geesperantistoj el 18 landoj. Jam sabate, ĉe la alveno, la loka komitato kunsidis. Vespere okazis interkonatiĝo. Centro Babylon estas komplekso enhavanta hotelon, restoraciojn, konferencojn, amuzejojn, naĝejon, butikojn kaj aliajn instalaĵojn.

La dimanĉa solena inaŭguro komenciĝis gaje per dancoj kaj kantoj fare de lernejana infangrupo "Jizerka". Infanoj estis bele kostumitaj. Sur la podio trafe ornamita per la slogano "La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn" eksidis gravuloj, kiuj salutis kaj bonvenigis la ĉeestantojn. Sekvis salutoj de landaj sekcioj de IFEF kaj oni legis plurajn alvenintajn salut-mesaĝojn kaj bondezirojn de eminentuloj. Pro siaj meritplenaj agadoj por IFEF estis honorigitaj s-ino Anna Abelovská, kiu multe

zorgis por bona disvolviĝo de la kongreso, la prezidanto de LKK s-ro Ladislav Kovář kaj s-ro Jindřich Tomíšek, kiu konstante kontribuas al diversaj revuoj tradukante novaĵojn el la fervojsfero por la internacia esperantistaro. Post kantado de la Esperanta himno la prezidantino de IFEF Rodica Todor el Rumanio malfermis la kongreson. Antaŭ la komuna fotado sub la bonveniga banderolo de la hotelo Babylon kelkaj partoprenantoj prezentiĝis en siaj fervojistaj uniformoj.

Vespere koncertis la ĥoro Bendl el Česká Třebová, kies du membroj Marie kaj Alois Klumpar kongresis kun ni. El Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, venis kvarpersona delegacio kun la urbestro Gerhard Walter por prezenti la urbon kaj varbi por la venontjara IFEF-kongreso, kiu okazos tie de la 19-a ĝis la 25-a de majo. Je la fino de la kongreso estis transdonita la banderolo kun la listo de la okazintaj kongresoj.



**La reloj ligas la landojn,
Esperanto la popolojn**



Belega kaj bunte ilustrita invitbroŝuro konatigis nin kun la vidindaĵoj de Liberec, ĝia ĉirkaŭaĵo, kaj prezentis al ni la ekskursan programon. La kongresa libro enhavis ĉiujn necesajn informojn. En la kongresa teko troviĝis aliaj dokumentoj kaj donacetoj de la fervoja kompanio. Efektive ni estis plurfoje pridonacitaj. Krome la urba administracio de Liberec donacis al ĉiuj partoprenantoj senpagan veturadon per publikaj transportiloj dum la kongresa semajno.



Fervojistoj havis okazon en siaj kunsidoj trakti diversajn aktualaĵojn kaj movadajn aferojn. Dum la prelegoj kaj fakaj kunvenoj oni eksciis pri sekurecistoj kaj instalaĵoj, pri trajnfikregado kaj pri eŭropaj fervojkoridoroj. Oni parolis ankaŭ pri aliaj interesaj temoj. Estis menciita nova moderna kaj multifunkcia trafikterminalo en la urbo Česká Třebová, inaŭgurita pasintjare en septembro. Ĝi daŭre ricevas diversajn premiojn pro efika investo.

Bone funkciis libroservo, estis eldonitaj E-bildkartoj kaj glumarkoj pri la kongreso. Porokazan stampadon prizorgis oficistinoj de la Ĉeĥa Poŝto. Ĉiutage aperis Kongresa Bulteno, el kiu oni eksciis pri okazintaj eventoj. Ankaŭ la ĉeĥa ĵurnalo "Mladá fronta Dnes" raportis pri la kongreso. Radioamatoroj povis radie kontakti aliajn interesulojn de tiu-ĉi hobbio.

Dum la tri duontagaj ekskursoj la partoprenantoj konatiĝis kun kelkaj historiaj vidindaĵoj de Liberec, pri kiuj parolis la loka esperantisto Miroslav Kazdera en sia prelego kaj promeno tra la urbo de li gvidata. Ni ankaŭ vizitis belan botanikan ĝardenon kaj unikan ZOO-ĝardenon kun blankaj tigroj kaj aliaj ekzotikaj bestoj. Krome allogis ekskurso al la Valo de Kristoforo. Tie oni admiris astronomian horloĝon kaj romantikan trajnponton. Ne pretervidebla estas la monto "Ještěd" kun sia dominanta telekomunika blank-arĝenta turo kun hotelo. Tuttaga ekskurso gvidis iujn partoprenantojn al Prago, alia celis viziton de du regionaj kasteloj. Ambaŭ ekskursoj kontentigis ĉiujn.

El la vesperaj programoj elstaris la Internacia balo kun tombolo kaj abunda bufedo. Ne mankis la tipa ĉeĥa (saniga) likvoro "Becherovka", kiun ĉiuj povis laŭplaĉe konsumi. Per siaj kantoj ĝojigis nin la famkonata fonia ŝatata JoMo el Tuluzo. Krom li koncertis simfonia orkestro, la ĵaza grupo "Big Band" kaj la popola muzikgrupo "Dudáček", kiu uzis, krom aliaj instrumentoj, ankaŭ tipan sakfluton. Ĉiuj vesperaj prezentoj plaĉis al la publiko, pri kio atestis entuziasmaj kaj longaj aplaŭdoj.



IFEF-kongreso okazis en Ĉeĥio jam la trian fojon. Grandan dankon al la organizantoj de la ĉi-jara brila kongreso! La impresoj estas bonegaj!!! Ĉiuj estis ravitaj kaj ege kontentaj hejmenirante kun belaj kaj neforgeseblaj travivaĵoj. Espereble ankaŭ la venontjara IFEF allogos multajn esperantistojn al Herzberg.

Liba Gabalda

LA VOĈOJ DE ESPERANTO



Esperanto en via hejmo - Esperanto en viaj oreloj.

Bertrand spertas pri aŭskultado de radio en Esperanto. Jen li invitas nin same ĝui tiujn novajn eblecojn dank'al interreto.



Komencintoj, komencantoj, kaj spertaj parolantoj ne ĉiutage, vi havas la okazon konversacii kun esperantistoj el la tuta mondo. Sed ne malesperu, esperant-lingvaj voĉoj venas al vi. Malfermu al ili viajn orelojn. Per la ilo komputila vi povos ilin aŭskulti tagnocte, vi eĉ ne bezonas priatenti la horaron, vi nur tajpas en la adresloko de via ekrano la http-adreson. Kaj jam vi aŭdas, ekzemple, la agrablegajn voĉojn de Karlina kaj Arono el Kanado. Ne nur aŭskulti vi povos ilin per via maŝino, sed eĉ kapteblas la karaj voĉoj, elŝutante ilin al MP3-dosieroj. Tiam vi ankaŭ povos ilin transigi al viaj MP3-legilo aŭ poŝtelefono kaj ili akompanos vin, kiam vi piediras aŭ bicikladas tra la naturo kaj kiam vi survojas al laborejo.

Jen listo da radio-elsendejoj el diversaj partoj de la mondo :

| | |
|---|---|
| Radio Verda el Vankuvero, Kanado : | http://radioverda.com |
| Radio Kubo el La Havano, Kubo : | http://www.ameriko.org/radiokubo |
| Radio Esperanto el Kaliningrado okcidenta Rusio : | http://la-ondo.rpod.ru |
| Radio 3zzz el Melburno Australio: | http://melburno.org.au/3zzzradio |
| Parolu Mondo el Brazilo : | http://parolumondo.com |
| Radio China internacia el Pekino : | http://esperanto.cri.cn |

Mi posedas plurcentoj da kanzonoj, radioelsendoj kaj diversaj son-dosieroj en mia komputilo. Se ankaŭ vi ŝatus kolekti son-dosierojn, mi pretas helpi vin, kiam helpo estas bezonata.

bwick@laposte.net 09 75 69 32 93

Bertrand

Nova aŭtomata tradukilo el la franca al ESPERANTO

Aperis aŭtomata tradukilo el la franca al Esperanto, libere uzebla ĉe <http://apertium.saluton.dk>

La tradukilo estas bazita sur Apertium — rimedaro por konstrui aŭtomatajn tradukilojn, per kiu jam funkcias tradukiloj el la kataluna, hispana kaj angla al Esperanto kaj de Esperanto al la angla. Ĉiujn eblas uzi ĉe la supra adreso. Entute per Apertium funkcias ĝis nun 42 tradukiloj.

Apertium estas programaro malfermfonta kaj libera, same uzanta liberajn datumarojn. Ekzemple por ĉi tiu nova tradukilo el la franca al Esperanto estas ĉefe uzita kiel baza dulingva vortaro la Reta Vortaro, pro tio, ke ĝi estas libere uzebla kaj havas franclingvajn ekvivalenton preskaŭ por ĉiu vorto. La tutan fontokodon kaj lingvan datumaron de Apertium kaj de ties tradukiloj eblas elŝuti el <http://sourceforge.net/projects/apertium/>

Esperable tiu lanĉo ne nur liveros novan interesan rimedon, sed ankaŭ spronos pliajn homojn ekinteresiĝi pri la kreado de pliaj aŭtomataj tradukiloj aŭ la polurado de la jam ekzistantajn. Unu el la atutoj de Apertium estas, ke ĝia strukturo permesas, ke nefakuloj pri komputila lingvistiko povas evoluigi tradukilojn, kiuj donas kontentigajn rezultojn. Krome, tio, ke Apertium estas malferma, universitate stirata projekto, permesas, ke studentoj evoluigantaj tradukilojn ricevu monhelpojn, ankaŭ se temas pri tradukiloj el kaj al Esperanto. Ekzemple jam du jarojn Apertium ricevis de Guglo po naŭ 5000-dolarajn stipendiojn por studentoj evoluigantaj novaĵojn dum la nord-hemisfera somero. Tiel kredeble denove okazos post nur kelkaj semajnoj. Ĉar esperantistoj bone situas interne de la Apertium-projekto kaj mem Esperanto estas bone konsiderata en ĝi, estas tute eble ricevi stipendion por krei en tri monatoj kernon de tradukilo inter Esperanto kaj (hindeŭropa) lingvo. Cetere, sinanoncintoj ja ricevos la helpon de la cetera Esperanto-grupeto en Apertium. Aliflanke, ne-studentoj estas ja ne malpli bonvenaj en la projekton.

Interesiĝantoj iel kontribui ne hezitu aliĝi al la retlisto http://groups.google.com/group/apertium_eo aŭ eventuale kontaktu hectoralos@gmail.com

Apertium

Liber-programara motoro kaj ilaro por maŝina tradukado

testi | **kio estas apertium** | **elŝuti** | **dokumentaro** | **kontakto**

Tekst-traduko

Apertium povas kaj traduki platajn tekstojn kaj dokumentojn en diversaj formatoj kaj vi povas retumi kaj traduki per ĝi. Vi povas ankaŭ uzi nian vortaran servon kaj elprovi la ne-publikigitajn versiojn de la tradukiloj.

Direction:

Lundaj konversaciaj kunvenoj



Niaj lundaj konversaciaj kunvenoj sukcese okazis de januaro ĝis junio 2011. La lasta okazis la 27an de junio en Mulhouse. Jacques kaj Bertrand estas la instigantoj kaj la regulaj organizantoj. Jam ili planas ion por la venonta lerno-jaro 2011/2012. Sed fakte, kiel nomiĝas niaj kunvenoj?? Jen la ripensoj de Jacques:

Alvoko por la venonta sezono

Lundaj babiloj, lundaj konversaciaj kunvenoj, lundaj diskutaj tabloj : post unu jaro de vivo, nia simpatia regula kunveno ankoraŭ ne sukcesis trovi taŭgan nomon. La afero estas tre grava, tial la kunsidantaro, kunvenante last-foje ĉi-jare, solene kaj unuanime decidis post gravaj debatoj reenkonduki ĝin por la venonta sezono por finfine solvi tiun gravan problemon!

Ni do kunvenos la samajn tagojn foje en Saint-Louis foje en la miluza kafejo, kie kutime kunvenas ankaŭ ĉe la najbara tablo alzata «stammtisch» : esperanto kaj dialekto, sama batalo.

Ĉi-jare ni kunvenis kvin- aŭ sesope, kelkfoje iom pli, kiam ankaŭ fremdaj samideanoj (bazelaj kaj eĉ rumanaj) aliĝis. Ni babilis en amika etoso sen tagordo, iuj faris proponojn pri la vivo de nia asocio, aliaj sciigis proprajn esperantajjn spertojn kaj nature sekvis la altvaloraj konsiloj de la majstro Andreo ĉiam kompreneble antaŭ glaso aŭ plado. Dankon al Andreo kaj Bertrand, kiuj lingve helpis la freŝbakitajn esperantistojn.

Do, por la venonta jaro alvoko estas adresata al ĉiuj lernantoj kaj studentoj, kiuj deziras parole progresi kaj al la nepre necesaj esperantaj fakuloj « aliĝu al ni, almenaŭ kiam vi povos, por vivigi nian belan lingvon. Jam nun rezervu la jenajn lundojn »

26a de septembro en Saint Louis
24a de oktobro en Mulhouse
28a de novembro Saint Louis
30a de januaro Mulhouse
25a de junio Saint Louis

27a de februaro Saint Louis
26a de marto Mulhouse
30a de aprilo Saint Louis
31a de majo Mulhouse

Saluton kaj bonajn feriojn al ĉiuj

JACQUES

En Mulhouse: Tre verŝajne la kunvenoj okazos en la kafejo "le Printemps"
7 rue du printemps 68100 Mulhouse.

En Saint-Louis: Supozeble la kunvenoj okazos ĉe Antoine, 7 rue des Etangs,
Saint-Louis-Neuweg.

Aktualigitajn informojn vi trovos en nia retejo:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Krome nia dissendo-listo ebligis informi vin:

mulhouse-esperanto@yahoogroups.fr

Jacques ankaŭ aktivas en la alzaca asocio "Ragaboga" (ĉielarko), kie li informas pri Esperanto

« Ragaboga » estas societo, kiu promocias la alzacan kulturon kaj neniam forgesas la aliajn. Dum ĉiu vesperkunveno la prezentado de temo estas akompanata de manĝaĵoj, vinoj kaj kantoj elektitaj rilate ĝin. Do, en majo la temo estis : **Esperanto**. Mi prezentis ĝin en 3 partoj : historia resumo de la internacia lingvo – Esperanto hodiaŭ (evoluo kaj problemoj) - kial Esperanto estas facila, ĝusta kaj riĉa lingvo. Ĉe la fino de ĉiu parto mi prezentis unu esperanto-kanton, kiun Daniel Muringer de la grupo « Geranium » kantis kun sia tirharmoniko : « Amaras vundo » (greka melodio) « Da nu da na » (cigana kanto) kaj nature « la Espero ». Daniel kantis ankoraŭ aliajn rusajn kaj polajn kantojn.

Jean pierre Reduron (vinologo) prezentis usonajn, italajn kaj alzacajn vinojn, fine la ĉef-kuiristo pretigis eŭropajn manĝaĵojn. Resume, estis bela internacia vespero, kie multe da homoj malkovris la historion kaj la intereson de la esperanta lingvo

Jacques

Jarfina fest-manĝo en Ungersheim

La taverne cĉte Ecomusée

Ni variu niajn jar-finajn fest-manĝojn kaj ni aldonu la eblecojn viziti la sub-ĉielan muzeon Ecomusée.

Jen la ideoj de Simone, kiu ja volontulas de tempo al tempo en tiu muzeo. Krome ŝi eĉ sukcesis havigi al ni enir-biletojn por la muzeo. Tial pluraj partoprenantoj jam en la posttagmezo de la unua de julio venis al la muzeo por ĝin viziti.

Interalie Simone estis nia tre sperta kaj lerta gvidantino por sekvi la proponitan programon. Do, antaŭ la fest-manĝo ni promenis unue tra la muzeo.



Jen moderna enirejo al la muzeo.

Sed interne troviĝas multaj malnovaj domoj, plej ofte el sudo de Alzaco, el la regiono Sundgaŭ. Interne de la domoj eblas admiri malnov-stilajn loĝejojn, kuirejojn, ĉambrojn sed ankaŭ malnov-stilajn lernejan klason, la instalaĵon de frizisto, kaj de multaj aliaj metiistoj, forĝisto, ĉarfaristo, ŝuo-riparisto, ĉar-pentisto, abelo-bredisto, draŝisto.





Jen farmistino bone klarigas, pri la diversaj bovinoj en Alzaco, pri la lakto-produktado. Poste ŝi melkis 3-jaran bovinon kaj eĉ proponis al la spektantoj tuj gustumi la varman freŝan lakton. Per tiu lakto oni produktas kazeon, selakton, fromaĝon. Ĉio bone klarigita en la domo pri "gusto kaj koloro".

Sed la tempo pasis kaj la horo de nia rendezuo en la restoracio "La Taverne" proksimiĝis.



Iuj venis nur al la restoracio kaj jam okupis la rezervitan tablon. Entute ni estis 17 personoj, membroj de nia grupo kaj partneroj. Tial la konversacioj okazis plurlingve.

La servo estis tute akurata



Fotoj kaj raporto de A. Grossmann

kaj rapida de la antaŭ-manĝo ĝis la kafo. Dume, diskutoj kaj babiladoj abundis.

Ŝajne ĉiuj estis kontentaj pro la servo kaj la manĝo.

Ni danku al Simone pro tiu bona sugesto kaj pro la ebleco viziti la muzeon.

33a BAVELO-Seminario

Paroĥa centro St.
Fidelis
Romäusring 20, 78050
VS-Villingen

Tel. Fidelis +49 – (0) 7721 / 2 20
73, Fakso +49 – (0) 7721/ 2 20 74

70a staĝo de

esperanto
France-Est

Okazos en Villingen en
Germanio
de 16a ĝis 18a de
Septembro 2011



Esperanto-lernado estas plezuro. Aparte en la gaja komuneco de internacia lern-semajnfino. Vera lernfesto estu la ĉi-jara BAVELOSeminaro en Villingen en Nigra Arbaro. Kiu konatiĝis kun Esperanto per interreto, kiu mem instruis sin per „Lernu.net“ kaj tiel ekĝuis tiun spritan lingvon, tiu baldaŭ emas konatiĝi kun aliaj, kun sam-entuziasmuloj. Ĉi-semajnfino centriĝas al la parolado, al la ek-parolado.

Kursoj por komencantoj kaj komencintoj kun Johannes Mueller kaj Marek Blahuš. **Voĉlegado** estas ĝuo. Por la aŭskultanto, ĉu eta – ĉu granda, sed ankaŭ por la voĉleganto mem. Fascinan voĉlegadon oni povas lerni. Christoph Frank, magiisto kaj pupteatristo, montras per plezuriga kurso kiel oni atingu ravan legadon. Kaj ne forgesu kunporti kelkajn tekstojn, kiujn vi tre ŝatas.

La Esperanto-mondo estas bunta.

Kiu multe vojaĝis, povas rakonti pri tiuj facetoj. Viglaj priskriboj pri travivaĵoj ĉe amikoj kaj festoj trans la propraj lingvaj baroj donas al ni ĉiuj la emon al propraj spertoj tiaspecaj.

Ĉu mi estas malparolema? Ne en Esperantujo. Entuziasme ardiĝi en Esperantaj diskutoj, tio prosperigas la vivoĝojon kaj preparas vin al ajna interparolado.

(Alois Eder) Esperanton instrui, tio estas ankaŭ lernebla per observado, kiel aliaj spertaj instruemuloj faras. En Villingen vi havos tiun eblecon.

Por Esperanto-parolantoj, kiuj volas iom ripozi de la lernado, sed tamen ĝui la etoson de la staĝo, troviĝas bunta ekskursprogramo. (Inge Simon)



Kursoj kaj kursestroj petitaj:

- A Komencantoj (Johannes Mueller, Stuttgart)
- B Komencintoj (Marek Blahuš, Brno, Ĉeĥio)
- C Bukeda Kurso: · Voĉlegado - kia ĝojo (Bloko 1,2,3 - Christoph Frank),
Nia bunta Esperanto-mondo - kun viaj kontribuoj (4 -André Grossmann)
Diskutigi kaj pacigi (5 - Alois Eder)

Partoprenkotizo: 30 € (por junuloj ĝis 30-j. rabatite 15 €)

Tranoktado:

- La proksima Hotelo Romäus (2-minuta piedrado) disponigas 15 unu- kaj du-litajn ĉambrojn (1-litaj 40 € ĝis 45 € ; 2-litaj 70 € ĝis 79 €).
- Krome mendeblas tranoktadoj pere de la turisma oficejo (adresoj en la aliĝilo)
- En la paroĥa centro Fidelisheim mem eblas simpla surmatraca tranoktado (matracon bv. kunporti mem) – kun matenmanĝo: 10 € / nokte

Programo

vendredo, 16-a septembro 2011

Alveno ĝis la 18-a

15:00 por frualvenintoj:vizito al muzeo *Franziskanermuseum* kun arkeologiaj trovaĵoj de Magdalenberg

18:30 en preĝejo St. Fidelis: paroĥa diservo en la germana kun salutado de la esperantaj gastoj

19:30 konatiĝo kun ioma manĝeto (financa kontribueto)

20:30 salutvortoj, teatraĵo "ElefanTonoj" (en Esperanto) kun Christoph Frank, poste amika kunesto

sabato, 17-a septembro 2011

09:00 – 12:00 kursoj –
blokoj 1 kaj 2

12:15 tagmanĝo laŭ la menukarto en gastejo Grossherzog

14:00 – 16:00 urbogvidado tra Villingen en Esperanto kun Josef Schiffer

16:00 kafo kaj kuko

16:30 – 18:00 kursoj –
bloko 3

18:00 vespermanĝo laŭ la menukarto en gastejo Grossherzog

20:30 Ludvespero kun Christoph Frank

dimanĉo, 18-a septembro 2011

09:00 – 12:00 kursoj –
blokoj 4 kaj 5

12:15 tagmanĝo laŭ la menukarto en Grossherzog

poste komuna ekskurso al la akvofaloj de Triberg (la plej altaj en Germanio)

Aliĝilon bonvolu sendi al:

S-ino Inge SIMON,

Brünner Str. 20

DE-73431AALEN

Tel. 00.49-7361/ 360 615,

Inge.Simon@esperanto.de

La aliĝo validas post alveno de mono:

Pagebla per ĝiro al

CCP Esperanto France-Est

1997 72 W Nancy

per franca ĉeko al

Esperanto France-Est

sendata al

André GROSSMANN

5, rue des Pyrénées

68390 BALDERSHEIM

ret-adreso: andreo.ag08@free.fr

Aliĝilo al 70a staĝo de Esperanto France-Est en Villingen

Mi partoprenos kurson

- A** : komencantoj **B** : komencintoj **C** : Bukeda kurso

tranoktado / manĝado:

- ĉambro – bonvolu mendi mem vian ĉambron, al eksterlandanoj ni volonte helpas pri mendado –
 Hotelo Romäus (situas plej proksime) kun 15 unu- kaj dultitaj ĉambroj (1-litaj 40€ĝis 45€; 2-litaj 70€ĝis 79€). adreso: Hotel Romäus, Warenburgstr. 4, 78050 Villingen- Schwenningen, Tel. +49.7721-206 6030 (atentu: la numero trovebla en interreto/Guglo **malĝustas!**), Faks. +49.7721-206 60 311. La hotelo ne havas retejon, sed tamen ret-adreson: info@hotel-romaeus.de
- Pri aliaj tranokteblecoj demandu al la turisma oficejo:
 Tourist-Info, Niedere Str. 88, 78050 Villingen-Schwenningen,
 Tel. +49 7721-822340, retadreso: tourisinfo@villingenschwenningen.de
- Mi tranoktos en Fidelisheim sur mem-alportita matraco kaj partoprenos la matenmanĝon tie:de
 - vendredo/sabato sabato/dimanĉo
- Mi partoprenos la programon por fru-alvenintoj (vendrede posttagmeze)
- Mi partoprenos la manĝeton (vendrede vespere)
- Mi partoprenos la komunan manĝon laŭ menukarto
 (Pizzeria Grossherzog, Großherzog-Karl-Str. 10 A, 78050 VS,
 Tel. +49 – (0) 7721-24784)
- sabata tagmanĝo sabata vespermanĝo dimanĉa tagmanĝo
- Mi volas manĝi vegetare Mi havas alergion kontraŭ _____
- Mi ĝiros la monon al : Esperanto-France-Est CCP 1997 72 W Nancy

| S-ro S-ino | Familia nomo | Persona nomo |
|--|--------------|--------------|
| 1 | | |
| 2 | | |
| 3 | | |
| 4 | | |
| Adreso | | |
| | | |
| Telefono: | | |
| | | |
| Ret-adreso: | | |
| | | |
| Mi pagas la sumon..... al Esperanto France-Est | | |

lom de someraj rendevuoj

18 - 23. julio

Staĝo en Kvinpetalo Praktikado de la lingvo. Komencantoj kaj 2a-grada nivelo. Inf.: Kvinpetalo, 15 rue du Lavoir, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel.: +33 (0) 549 034 314. rete: informoj@kvinpetalo.org

23 - 30. julio

96-a Universala Kongreso de Esperanto, UK en Kopenhago, Danio. Inf.: Universala Esperanto-Asocio, Nieuë Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Rete: kongreso@co.uea.org, tel.: +31 (0)10 436 1044, fakso: +31 (0)10 436 1751

23 - 30. julio

Alternativa semjano en kastelo Greziljono, Francio. Temoj ekologio, kuracmetodoj, verda turismo. E-kursoj matene, koncerto. Vegetaraj manĝoj. Inf.: Kulturdomo de Esperanto, Château du Grésillon, FR-49150 St. Martin d'Arcé, Francio, rete: kastelo@gresillon.org

30. julio - 5. aŭgusto

3-a Kulturturisma Semajno en Herzberg - la Esperanto-urbo. Venos homoj el nemalmultaj landoj, inter aliaj ankaŭ Go-grupo el Japanio kun la fama Do, specialaj eventoj por vi! Inf.: Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6; Tel:+49/(0)5521-5983

30. julio - 6. aŭgusto

Turisma semajno en kastelo Greziljono, Baugé, Francio. Kursoj de franca lingvo kaj Esperanto matene. Ekskurso al Luar-kasteloj posttagmeze. Koncerto kaj fotoprelegoj vespere. Inf.: Kulturdomo de Esperanto, Château du Grésillon, FR-49150 St. Martin d'Arcé, Francio, rete: kastelo@gresillon.org

8 - 15. aŭgusto

FESTO en Greziljono-Kastelo, Francio. En la kastelo de Greziljono okazos FESTO, junulara renkontiĝo ĉiujara organizata de internacia teamo. Vinilkosmo disponebligos ĉiutagajn koncertojn dum la tuta semajno, en neforgesebla etoso kun densa vespera programo. Inf.: alekĉo@gmail.com kaj bjokac@gmail.com

9 - 13. aŭgusto

Staĝo en Kvinpetalo Altnivela tradukado kun Brian Moon. Inf.: Kvinpetalo, 15 rue du Lavoir, FR-86410 Bouresse, Tel.: 0549 034 314. rete: informoj@kvinpetalo.org

13 - 20. aŭgusto

15-aj internaciaj pluezekaj renkontiĝoj en Pluezec. Francio. Internaciaj pluezekaj renkontiĝoj, kursoj, atelieroj, dancoj, prelegoj, turismadoj, vesperumoj ktp. Inf.: Plouezec-Esperanto, 5, hent toul broc'h, FR-22470 Plouezec, Rete: pluezek@gmail.com

15 - 21. aŭgusto

21-a KISO en Marburg (Germanio): "ludi, krei, sperti vin mem". Inf. Gunter Neue, Marburga Esperanto Grupo, Afföllerstr. 19, DE-35039 Marburg/Lahn, Germanio. Rete: kiso@esperanto.de

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.

Fotoj pri

